



2\*1993\*155

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA-ESPERANTO-ASOCIO



# INTERNACIA KOMITATO POR ETNAJ LIBERECOJ



IKEL seminaros en Svislando:

## ETNISMO: FUNDAMENTOJ, PROBLEMOJ KAJ PERSPEKTIVOJ

Kadre de tiu ĉi ĉeftemo, manpleno da kontribuantoj prelegos kaj / aŭ gvidos debatojn pri teoriaj kaj praktikaj aspektoj:

*- Kio kaj kia estas etno? - Kiuj rilatoj ekzistas inter etnoj kaj nacioj? - Ĉu oni denaske apartenas al unu certa etno? - Ĉu oni povas eksetnaniĝi? - Kio okazas en la balkana duoninsulo kaj en aliaj konfliktozonoj? - Kiun rolon ludas /-u IKEL?*

La seminario okazos de la 19-a (vespere) ĝis la 23-a (matene) de julio 1993 en la oĝoj de "Kultura Centro Esperantista" en La Chaux-de-Fonds (Svislando).

La kotizoj, kiuj kovras tranoktadon, manĝaĵojn kaj programon, estas jenaj por unu persono: 300 SFR (en 4-lita ĉambro), 340 SRF (en dulita ĉambro), 420 SFR (en 1-lita ĉambro).

Aliĝante rekte ĉe KCE (poŝtfolio 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) bonvolu indiki por ĉiu persono: familian kaj individuajn nomojn, kompletan adreson (kun telefono), naskiĝ-jaron, elekton de dormeja kategorio kaj "IKEL"-seminario. Aliĝo validos nur se por ĉiu persono estas antaŭpagitaj po 150 SFR al KCE (poŝtĝirkonto n-ro 23-2921-8, poŝt-oficejo La Chaux-de-Fonds), kun mencio "antaŭpago: IKEL-seminario".

Petu pliajn informojn ĉe KCE aŭ ĉe IKEL (Im Römerfeld 44, D-W-5180 Eschweiler).

## UMBERTO ECO PRI ESPERANTO

Itala sciencisto kaj verkisto Umberto Eco, mondfama pro siaj eminentaj romanoj *La nomo de la rozo* (filmigita) kaj *La pendolo de Foucault*, partoprenis ekde oktobro 1992 kiel eksterlanda profesoro en la Pariza Collège de France kvarmonatan kurson *La serĉo de perfekta lingvo*, kiu instigis lin okupiĝi ankaŭ pri Esperanto. Li ne parolas ĝin, sed li studis ĝian gramatikon. La 20-an de januaro 1993 vizitis lin en lia Pariza loĝejo esperantistoj Francois Lo Jacomo kaj István Ertl. Pri sia vizito ili verkis tripaĝan artikolon por la gazeto Esperanto, el kiu ni ĉerpis por vi kelkajn interesajn ideojn:

"...mi kredas, ke neniu timas Esperanton. La ĝenerala sinteno estas senintereso. Prenu min kiel ekzemplon. Ĝis antaŭ ses monatoj mi fajfis pri Esperanto. Vere. Malgraŭ ke mi estas ekzemplo de klera homo kun multe da scivolo. Necesis, ke mi eklaboru pri *La serĉado de perfekta lingvo*, la temo de miaj preleĝoj ĉe Collège de France, por veni al la internaciaj lingvoj."

"Mi devas rekoni, ke, kompare kun aliaj projektoj de internacia lingvo, malantaŭ Esperanto staras iu ideologio, kio klarigas, kial ĝi eltenis dum la aliaj fiaskis. Ekzistas Esperanta "religio", kiu igas homojn lerni kaj paroli la lingvon, dum ne ekzistas "religio" de Volapuk aŭ de Ido."

"La homoj perceptas Esperanton nur kiel proponatan ilon. Ili konas nenion el la idealisma elano, kiu animas ĝin. Tamen, mi estis ĉarmita de la biografio de Zamenhof, ne de la gramatiko de Migliorini. Vi devus pli konigi tiun aspekton! Kial oni neniam faris filmon pri Zamenhof? La historia-

ideologia flanko de Esperanto restas absolute nekonata."

"Cetere, la artefariteco de Esperanto ne estas malavantaĝo. Antaŭ ol havi pli klarajn ideojn pri Esperanto, ankaŭ min ĝenis ĝia artefariteco. Sed, fakte, se mi ne sciis, ke temas pri artefarita lingvo, mi povintus kredi ĝin natura."

"Mi vidas, kio nun okazas en Francio: oni daŭre parolas pri la danĝereco de la angla, sed la fantomo, kiu efektive obsedas francojn, estas la germana. Baldaŭ ili estos pretaj subteni vehiklan lingvon, nur por malhelpi plifortiĝon de alia lingvo. Ekde tiam la rezisto de instancoj povus malaperi."

"Kiu lernas duan lingvon, tiu ĉiam estas pli malfermita por lerni iun trian. Mi havas pri tio rektan sperton pro miaj filoj, kiuj estas dulingvaj. Por ili estas tre facile lerni trian lingvon, kiun ili eble poste forgesos, tamen... Ekzistas ia mensa preteco je la multeco de lingvoj. ... Se oni denaske scias, ke objektoj povas havi du nomojn, tio mense preparas al la ebleco, ke ekzistas eĉ tria nomo. Ankoraŭ malmulto estas konata pri dulingveco, sed nuntempe, kiam la internaciaj geedziĝoj fariĝas io tute normala en la eŭropa socio, ni havos eble pli bonajn studojn pri la temo... Tamen, ĉia formo de Esperanta dulingveco ŝovos Esperanton al minoritata pozicio, ĉar surstrate oni parolas la lingvon de la ĉirkaŭaĵo. Nome, la mito de gepatra lingvo estas malprava: la infanoj identiĝas ne kun la patrina lingvo, sed kun la lingvo de la domzorgantino ... Miaj filoj en Italio lernis la germanan de sia patrina, sed la lingvo, kiun ili uzas inter si, estas la itala."

(el "Esperanto 2/93")

## HOBBITOJ en Esperanto

"La hobbitoj estas malnova nacio de malgrandaj hometoj, pli malgrandaj ol nanoj aŭ pigmeoj. Ilia alteco atingas 60-120 cm. Ili amas pacon, trankvilon kaj bone plugitajn kampojn, neniam ili komprenis pli komplikajn maŝinojn, ol estas forĝistaj balgoj, akva muelejo aŭ permana teksmaŝino, sed ili tre lerte uzas instrumentojn. Eĉ dum malnovaj tempoj ili estis timemaj antaŭ "Grandaj Homoj", kiel ili nomas nin, kaj tial ili zorge nin evitas. Ili bone vidas kaj aŭdas kaj malgraŭ sia inklino al grasiĝado ili estas lertmovaj kaj scias rapide malaperi. Tial Grandaj Homoj ilin neniam vidas."

Proksimume tiel karakterizas siajn heroojn la angla verkisto kaj sciencisto J.R.R.Tolkien (1892-1973), kies verkoj nun furoras tra la mondo kiel plej ŝatata legaĵo de plenkreskuloj same kiel de infanoj. Lia fabela rakonto bazita sur mitologio pri elfoj, nanoj, hobbitoj, gigantoj, gnomoj, drakoj, sorĉistoj, reĝoj, magiaj glavoj, ringoj kaj aliaj mitaj fabelaĵoj estas plena ne nur de poezia fantazio, sed ankaŭ de saĝa filozofio. En **La hobbitoj** grupo da nanoj kun helpo de hobbitoj Bilbo kaj sorĉisto Gandalf post multaj aventuroj mortigas teruran drakon kaj liberigas la patrujon de la nanoj. Bilbo revenas hejmen kun magia fingroringo, kiun li trovis dumvoje. En **La Sinjoro de la Ringoj** montriĝas, ke la ringo de Bilbo estas la plej potenca el deko da similaj ringoj, kaj ke Saŭrono, la Obskura Sinjoro, volas akiri ĝin per ĉiuj rimedoj kaj pere de la ringo mastri la mondon kovrante ĝin per Nokto. Multegaj herooj en la tri-voluma verko batalas la senesperan batalon kontraŭ la regno

de malbono Moridoro - kaj la batalo ofte memorigas pri diversaj danĝeroj, kiuj nun minacas la homaron. Toksiĝo de la naturo, atomenergio, nia propra egoismo - jen la plej famaj el "obskuraj sinjoroj" minacantaj detruon nian mondon. Ĉu ni sukcesos defendi nin?

**La hobbitoj**, la unua el la menciitaj verkoj de Tolkien, aperis nun en Esperanto en traduko de Donald Harlow danke al rusa eldonisto Aleksander Korĵenkov, kiu pasintjare eldonis alian mondfaman fantazian libron: **La Majstro kaj Margareta** de Miĥail Bulgakov, pri kiu ni jam informis (nur ni devas korekti nian informon pri la prezo: la libro kostas 45 gld.).

Plie li proponas ankaŭ aliajn interesajn librojn, ekz.: **Anton Ĉeĥov: Sveda alumeto;** **Vladimir Vysockij: La birdo Gamajun;** **L.L.Zamenhof: Lingvaj respondoj;** **Aleksandr Saĥarov: Superforta ambicio;** **Stalin: Marksismo kaj lingvoscienco ktp.**

*Rimarkigo de la redakcio:*

*Sinjoro Korĵenkov intencas viziti nian komunan ĉeĥan-germanan kongreson kaj vendadi tie siajn librojn.*

---

**BERLINA MAJO 1993-05-14/17**  
**Klerigkibernetiko**  
**kaj Eŭropa komunikado**

La simpozio laboros en tri sekcioj: 1) la informintersanĝo dum instruado kaj lernado kiel kibernetika procezo kaj perspektivo post tri jardekoj; 2) interlingvistikaj kontribuoj al la lingvopedagogio; 3) kontinentala kunlaboro en kibernetiko kaj pedagogio. Kotizo 30 DM, por studentoj duono.

Aliĝojn akceptas: Prof.Dr. Krause, Technische Universität, Straße des 17.Juni 135, Berlin

---

## Diskutoj:

### Ĉu Esperanto restos lingvo de riĉuloj?

demandas la korea gazeto La Espero 6/92, ĉar esperantistoj bezonas **tempon** por klubumi, kongresi, legi, verki kaj monon por kotizi, vojaĝi, aboni, aĉeti librojn, korespondi, sed ambaŭ mankas. Tri ekzemploj el dekoj:

1. *Unu ordinara aerpoŝta internacia letero peza je 10 gramoj forrabas almenaŭ unu procenton de monata salajro por supera instruisto* (Doc. J.H.Gu, Ĉinio, 20.10.1990)

2. *Ni ne plu povas aboni eĉ la revuon El Popola Ĉinio, ĉar la abono egalas la trionon de salajro de universitata asistanto* (Prof. I.Bociort, Rumanio, 18.01.1991)

3. *Kun samideano ni kompiladis Esperantan-ĉeĥan geodezian vortaron kaj planis ankaŭ geodezian terminaron kun difinoj en Esperanto, sed tiu ĉi laboro nun haltis, ĉar mi havas pli gravajn zorgojn* (Inĝ.K.Votoček, Ĉeĥoslovakio, 04.02.1991)

La Espero aldonas: Ĉar Esperanto ne donas profiton, sed forrabas monon, estas tutnormale, ke ĝi estu flankenigita, kiam estiĝas problemoj familiaj, financaj, profesiaj... Ĉu ne endus pripensi, kiamaniere Esperanto povus fariĝi profesie utila kaj mondana lingvo?

**Se Esperanto restu nur kluba lingvo, tiam ĝi jam delonge finvenkis!!!**

### Respondo al Akademiano

En Starto 6/92, p. 17 - 20, aperis artikolo de s-ro akademiano Bernard Golden, kiu malfavore kritikis mian pritrakton pri la nomo L.L.Zamenhof, aperintan en Starto 2/92, p. 12. Mi tre bedaŭras, ke mi skribis mian artikolon tiel, kiel mi ĝin skribis. Mi ne havis je dispono la librojn, kiujn s-ro

akademiano indikas ĉe la fino de sia artikolo. Ili ĉiuj aperis en la 70-aj kaj 80-aj jaroj kaj tiam ne estis eble importi en nian landon ĉiujn eksterlande aperintajn librojn. Per la artikolo de s-ro Golden la legantoj de Starto eksciis faktojn ĝis nun al ni nekonatajn, sed lia esprimado kvalifikas malfavore ne nur mian tekston, sed ankaŭ lian personan kulturon. Adolf Staňura

### ĈU DEMONSTRACIOJ HELPOS?

En la lasta tempo la Esperanto-gazetaro alportis informojn, ke esperantistoj en kelkaj landoj organizis surstratajn demonstraciojn favore al Esperanto kaj al ĝia akceptigo kaj venkigo. Grupo da homoj portantaj bendojn kun grandaj surskriboj marŝis tra stratoj. Ĉu ankaŭ ni organizu ion similan?

Demando estas, ĉu ĝuste la demonstracioj estas tio, kion la publiko atendas de internacia lingvo (de Esperanto aŭ de iu alia lingvo) kaj ĉu tia ago nur ne kompromitus la movadon stampante ĝin per signo de milda frenezeco. Multaj esperantistoj jam akiris tian stampon ne nur por si mem, kiam per iom nenormala konduto ili klopodis turni atenton de "la ekstera mondo" al Esperanto. Sed ĉu nenormala konduto vekas kaj inspiras deziron simili al esperantistoj kaj aparteni al ilia movado?

La publiko atendas vigran uzadon de Esperanto en niaj klubejoj, sed ankaŭ ekster ili, precipe en komerco kaj tekniko, multajn lernilojn en la librovendejoj ktp., koncize dirite, riĉan aplikadon inter esperantistoj mem. En vigran kaj riĉan vivon de Esperantujo la homoj povus envicigi. Sed kion fari kun malbone funkcia kaj krokodilanta movado, kiu preferas propagandi kaj propragandi...

Ekonomiaj ŝanĝoj devigis mian amikon serĉi ion, per kio li kapablas vivteni sian familion. Li sidigis sin en ŝuldojn ĝis super la oreloj, uzis sian dometon kiel garantiaĵon kaj per *leasing* li pruntis aŭton. Peugeot. Post du tagoj li telefonis al mi: "Traduku al mi la instrukciaron, ĝi estas en la franca, germana, hispana, portugala, angla ..." Mi venis kaj la francajn instrukciojn tradukis. Krom kelkaj anglaj vortoj, sed tiujn ni divenis. La amiko veturas, ricevis unuajn mendojn kaj konstatis, ke dum longaj noktaj vojaĝoj li bezonas radion. Oni aldonis ĝin al li. Blaupunkt. Ĉifoje li alveturis ĉe min. Li transdonis al mi libreton. Gaskone mi diras: "Nur kvin paĝoj. Morgaŭ vi havos tradukon." Li ne havis.

Mi estas produkto de humanisma edukado dum la milito kaj tuj poste. Sekve mi scias germane. Sed mi ne scias angle, kaj por tiuj kelkaj jaroj, dum kiuj mi ankoraŭ vivas, mi ne intencas lerni. Kaj en la germana teksto estis subite *direct software control, loudness, quick out, key card, display* ... Mi ne scias, kiu tradukis la tekston por mia amiko, sed min tio igis mediti.

La okcidenta parto de Germanio ankaŭ en la lingvo submetiĝis al la influo de la anglosaksa kulturo. La influo estas pli forta ol povus ŝajni unuavide. Ne malofte surprizis min en vendejo vendistino per esprimo *Ou key*. Sed nur nun mi havis tion nigrasur blanka. Estas vero, ke ankaŭ en la ĉeĥan, ĉefe teknikan, eniras novaj nocioj, tamen en malpli granda amplekso. Kvankam, pasis nur iom pli ol tri jaroj ...

La prezidento aperas sur la ekrano en trikotajo kun angla surskribo, estas jam konata

*moderatorinoj* (bela vorto, ĉu?), dum kies deĵoro en Radiojurnalo sonas eĉ ne unu ĉeĥa noto (jam eĉ la tro tolerema Dvořák en Televarieteo iomete teruriĝis), pri programoj de kinejoj ni espereble ne bezonas paroli (jam tri jarojn ni en kinejoj havas "ĉeĥoslovakusonon amikecon"), pri dramaturgio de teatroj preskaŭ ankaŭ ne, gramofondiksoj, televidaj kazetoj, revuoj, bulvardaj ĵurnaloj ... Kaj libroj. Iru por momento en librovendejon. Se ĝi estas ankoraŭ librovendejo kaj ne vendas ankaŭ televidilojn aŭ kosmetikaĵojn kaj lesivojn, vi renkontos tie objektojn, kiujn kritikis jam sinjoro Ĉapek. Kaj ankaŭ objektojn, kiuj pruvas, kiamaniere kaj kiaforte oni batalas kaj batalas por la intereso de Ameriko. Agento 007 kompare kun la menciita kiĉaro estas verko preskaŭ genia.

Tiel povas okazi, ke mi ĝisvivos, ke la pubera junularo ne plu dirados *vole, vole* (= bovo, bovo), sed *cow, cow* (kio ne estas la samo, sed similaĵo), kaj apud la katedralo de Sankta Vito - simile kiel apud la gotika katedralo en Milano - kreskos kolorpresa reklamo pri la franca versio de Disneyland.

Sub standardoj de marko kaj dolaro perdiĝas la kultura potencialo de ĉi tiu lando. Perdiĝas la nomoj de grandaj kreantoj kaj bonaj cerboj malaperas post la okcidenta ŝtatlimo. Simple tial, ĉar la naskiĝlando kapablas vivteni nur malgrandan parton de tiu riĉaĵo. La rezulto estas klara: Kosmopolita lando ja kun pasinteco, sed sen futuro. Unu nun neglektata klasikulo parafrasis: La historio ripetiĝas. Foje kiel tragedio, foje kiel farso.

Tamen por ridi - motivo malgranda.

(tradukis M. Malovec)

## KIOM LÄN LOM? KDE DOMOV MŬJ?

Jes, titolo miriga. Ĉu dive-  
neble, en kiu idiomo?

Post la "Ignota lingvo" de  
abatino Hildegardis (12-a  
jarc.) kaj "Balaibalan" de ŝej-  
ko Mohyieddin (16-a jarc.) kaj  
aro da aliaj projektoj estis la  
unua funkciinta planlingvo, de  
Martin Schleyer, kiu sukcesis  
formi sian organizaĵon kaj eĉ  
aranĝis tri kongresojn, el kiuj  
en la III-a (j. 1889) tiu plan-  
lingvo estis ekuzita kiel lin-  
gvo de traktado. La nomo de tiu  
projekto estis VOLAPŬK, volapu-  
ko (laŭ anglaj vortoj world  
speak).

VolapŬk do havas elstaran  
rolon en la planlingva histo-  
rio. La esperantista eldonejo  
Iltis en Sarlando eĉ nun daŭri-  
gas, studocela, eldonadon de la  
revueto "VolapŬkabladed". Sur  
la titolpaĝo de la 1-a numero  
(j. 1985), resp. n-ro 337, jar-  
kol. 29), estas portreto de  
"Johann M. Bakalarz-Srbecký",  
kun klarigo "der erste diplom.  
VolapŬk-Lehrer Mährens". Ni  
aldonu, ke tiu ĉi Jan Bakalář-  
Srbecký, pastro, fariĝis poste  
aktiva esperantisto, eĉ bonvola  
ekspedanto de la "Pacdefendan-  
to" de Rudolf Burda (1950-aj  
jaroj).

En la jaro 1887, aperjaro de  
"Lingvo Internacia de d-ro  
Esperanto", 15-jara nekonata  
studento ĉeĥa en Zbyslav ellernis  
volapukon; estis František  
Vladimír Lorenc kaj la junulo  
plenregis ĝin tiel, ke Schleyer  
titolis lin "Poedan" (volapuka  
poeto). Lorenc ankaŭ volapuki-  
gis la ĉeĥan nacian himnon, Kde  
domov mŬj?. Jen la unua strofo:

*Kiom län lom? Kiom län lom?  
Vats du meids aigonoms,  
fots zŭ klifs mufoköl tonoms  
influb nidom gölaflol,  
talapaladi logol.  
Beno binom atlän jönik,  
län bömänik obalom.*


Nur en 1889, estante proks.  
16 1/2 - jara, kiel ni scias el  
brazilaj postlasaĵoj, en la  
manojn de Lorenc venis la Fun-  
damento de Esperanto, kiun li  
tuj ellernis kaj jam en la po-  
sta jaro eldonis proprakoste la  
unuan lernolibron por ĉeĥoj. En  
1889 li forlasis volapukon kaj  
anstataŭ ĝi li samjare ekin-  
struis Esperanton en Prago (so-  
cieto u Pštrosů), vizitante  
ĝin, je kosto de la societo, el  
sia studloko en Kolín. Elmi-  
grinte en 1893 en Brazilon li  
fariĝis tie aŭtoro de dekoj da  
verkoj kaj poligloto eksterse-  
ria, sub la portugalforma nomo  
Francisco Valdomiro Lorenz.

Aldonendas, ke la unuan  
planlingvon por eŭropanoj kreis  
la bizanciaj apostoloj Cirilo  
kaj Metodio (Praslavonoj).

Jaroslav Mařík

## GRANDA VORTARO FRANCA-ESPERANTA

aperis en decembro 1992 en  
Francio. Ampleksa 944 paĝojn,  
32.000 vortojn kaj 100.000 es-  
primojn. Kompilis dum deko da  
jaroj teamo da spertaj gesami-  
deanoj, sub la kunordigo de **Ĵak  
Le Puil**, kaj **Jean-Pierre Danvy**.  
Investis por la realiĝo per  
siaj akurataj financaj partop-  
renoj pli ol **100 membroj de  
Klubo 87**, la franca klubo de la  
Jarcento. Realigis la franca  
asocio, **U.F.E. Havebla ĉe UEA**  
por 98 guldenoj aŭ ĉe Unuiĝo  
Franca por Esperanto por 250  
frankoj (+ sendokostoj).



## KVIN MANKANTAJ VORTOJ EN MALPLENA ILUSTRITA VORTARO: BRODKASTI, IVRITO, LOBIO, PENIO, SAFARO

Ĉi-foje ne estas komposterao en la titolo de mia artikolo. Mi intence skribis "malplena" por reliefigi unu el la kritikindaj aspektoj de **Plena Ilustrita Vortaro** kaj prezenti kontribuojn, kiu faros ĝin malpli malplena. Mi proponas, ke la redakcio de la nuntempe reviziata eldono de la vortaro inkludu la ĉi-sube listigitajn neologismojn laŭ la kriterioj de uzado fare de pluraj esperantistoj en publikigitaj tekstoj kaj ankaŭ registrado en etnolingvaj Esperanto-vortaroj.

### 1. brodkast/i (tr) - angla broadcast

Ulrich Lins citis la titolon "Azia-Pacifika Brodkasta Unio" en **Esperanto** (januaro 1990, pĝ. 28). Gaston Waringhien registris la verbon "brodkasti" kun la klarigo "dissendi per radiofonio" en sia Esperanta-franca vortaro en 1957. "Brodkasti" estas koncize difinebla jene: "uzi elektromagnetajn ondojn por disaŭdigo de la parolata lingvo, muziko kaj ankaŭ bildoj". "Disaŭdigi" ne estas konvena sinonimo, ĉar ĝia signifino estas tro ĝenerala, same kiel tiu de "dissendi". Se oni uzas tiujn vortojn, estas ĉiam necese specifi, ke temas pri radiofonia procedo.

### 2. ivrit/o - hebrea ivrith

En **Dia Regno** (oktobro 1979, pĝ. 87), artikolo pri poliglotaj esperantistoj, menciis, ke amsterdama plurlingvulo "nun studas Ivriton". En esperantologia artikolo publikigita en 1976, la kroata lingvisto d-ro Dalibor Brozovic skribis pri "ivritologia" universitata katedro. "Ivrito" estas la moderna hebrea lingvo parolata nuntempe en Israelo. Ĝi estas bazita sur la malnova aŭ biblia

hebrea lingvo. La esprimo "nov-hebrea lingvo" ne povas servi kiel sinonimo, ĉar ĝi estas ambigua; en la fruaj jaroj de la Esperanto-movado, pluraj esperantistoj uzis "nov-hebrea lingvo" kiel sinonimon de la jida, kiu estas ĝermana lingvo, ne semida. Simila lingvouzo troviĝas en la kazo de "helena" (la malnova antikva greka lingvo) diference de "greka" (la moderna lingvo de Grekio).

### 3. lobi/i (ntr) - angla lobby

En artikolo en **Starto** (n-ro 154, 1993, pĝ. 5) troviĝas jena frazo: "Ni urĝe bezonas fortajn premgrupojn (lobiojn)..." Estas strange, ke tie ĉi Esperanta vorto "premggrupo" estas glosita per neologismo! Kutime oni glosas neologismojn per sinonimoj en Esperanto aŭ ekvivalentaj vortoj en etnolingvoj. Ni proponas la sekvan difinon de la verbo "lobii", kiu havas pli precizan signifon ol "premggrupo": agadi por influi la sintendon de politikistoj, leĝfarantoj aŭ publikaj funkciuloj kun la celo akiri favoran traktadon por la intereso reprezentitaj de la lobiistoj, kiuj kune formas la lobion".

### 4. penio/o - finna penni

La manko de la substantivo "penio" en **Plena Ilustrita Vortaro** estas ekzemplo de riproĉinda diskriminacio kontraŭ Finnlando. En la artikolo pri "marko", la dua difino estas "monunuo en Germanujo kaj Finnujo". Poste estas resendo al "pfenigo", kiu estas centono de la germana marko. Mankas informo en la vortaro, ke centono de la finna marko estas "penio". Tiu ĉi vorto jam estis registrita en la sveda - Esperanta vortaro de Jansson, Lindén kaj



Gerdman, eldonita en 1934. "Penio" estas daŭre uzata de finnoj en siaj publikigaĵoj, do estas neniu dubo pri ĝia enradikiĝo en Esperanto. Estos skandala afero, se, okaze de la estonteca Universala Kongreso en Finnlando, "penio" mankos en la nova versio de **Plena Ilustrita Vortaro**.

#### 5. safar/o - sŭahila safari "vojaĝo"

La sŭahila vorto "safari" jam eniris plurajn etnolingvojn en neasimilita formo. Tradicie, safaro estas ekspedicio organizita en orientaŝtataj landoj en la formo de karavano kun la celo ĉasi sovaĝbestojn. Nuntempe, ĉar ĉasado estas oficiale restriktita, partoprenas en safaroj plejparte turistoj, kiuj "kaptas" afrikajn bestojn per fotoaparatoj.

La esperantigita formo "safaro" akordas kun la 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko rilate t.n. "fremdajn" vortojn.

Mi esperas, ke la redakcio de la reviziata **Plena Ilustrita Vortaro** akceptos mian proponon kaj registros la kvin vortojn, kiujn mi priskribis, Tiel, ilia nova vortaro fariĝos iomete pli plena.

Bernard Golden  
Damjanich u. 1/C.  
H-8200 Veszprém

---

#### BLINDULA MUZEO

sola en Ĉeĥa Respubliko, estis en 1992 malfermita en BRNO (adreso: Slepcké muzeum, Chaloupkova 7, 612 00 Brno. Inter la muzeaj troviĝas ankaŭ brajle presitaj Esperanto-gazetoj, inkluzive de *Aŭroro*, donacitaj de Vuk Echtner, kaj tekstoj pri la Esperanto-movado inter blinduloj, tradukitaj ĉeĥlingven el la prihistoria verko de S. Kamaryt. -we-

#### ELNA KONGRESOS EN WEST HARTFORD

Laŭ la anonco el Usono, la 41-a Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) okazos ĉe la Universitato de Hartford la 17.-20.7.1993. Nur neoficiala interkona vespero okazos jam la 16an de julio.

West Hartford estas mezgranda urbo situanta meze inter Novjorko kaj Bostono, do facile atingebla per interurba aŭtobuso, trajno aŭ aviadilo. Por informo pri la kongreso kontaktu ELNA, P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530, telefona numero: +1-510-653-0998.

#### SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ DE ESPERANTO EN USONO

Regule oni aranĝas somerajn Esperanto-kursojn ĉe Ŝtata universitato en San Francisco. 28.6.-16.7.1993 okazos la kursoj gvidataj de David K. Jordan, profesoro de antropologio el Universitato de Kalifornio, Mark Fettes, iama redaktoro de "Esperanto", kaj rusa lingvisto d-ro Boris Kolker.

Unusemajnan kurson de Esperanto (12.-20.6.1993) malfermos ankaŭ d-ro Humphrey Tonkin, rektoro de la universitato en West Hartford, eks-prezidanto de UEA. Lastsomere instruis tie ankaŭ d-ro John Wells, prezidanto de UEA. Ĉar la kurso okazos ĵus en la semajno antaŭ la kongreso de ELNA, vi facile povas partopreni ambaŭ aranĝojn.

Petu informon ĉe s-ino Hilda Grossman, direktoro de Someraj Programoj, adreso: Universitato Hartford, 200 Bloomfield Avenue, West Hartford, CT 06117, tel. +1-203-768-4401 aŭ +1-800-234-4412.

(La subajn informojn por *Starto sendis s-ano Jerald Veit, prezidanto de Sud-Novanglia Esperanto-Societo en New Hartford.*)

## FERVOJISTAJ PAĜOJ

**Fervojista sekcio** atentigas siajn membrojn, ke la vojaĝagentejo ČD TRAVEL AGENCY (Olomouc, ĉefa stacidomo, tel. ČD 950/2005) preparas por fervojistoj kun veturbileto FIP interesajn ekskursojn, ekz. **Germanio - Nederlando - Svislando** (27.- 30.5.1993, 620 Kč), **Lurdo - Parizo** (19.- 23.6.1993, 990 Kč), **Romo - Vatikano - Milano - Verono** (3.-6.7.1993, 590 Kč), **Venecio - Romo** (30.9. - 3.10.1993, 590 Kč).

(jt)

## DIVIDO DE ĈSD

La 31.12.1992 nuliĝis Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj kaj ekde 1.1.1993 fondiĝis Ĉeĥaj Fervojoj (České dráhy, ČD) kun sidejo en Prago kaj Fervojoj de Slovaka Respubliko (Železnice Slovenskej republiky, ŽSR). Inter ambaŭ respublikoj oni fondis 20 landlimajn transirejojn, sep el ili estas fervojaj: Čadce - Mosty u Jablunkova, Lúky pod Makytou - Horní Lideč, Horné Srnie - Vlársky průsmyk, Myjava - Vrbovce, Holič - Hodonín, Kúty - Lanžhot, Skalica - Sudoměřice.

(jt)

## BELULOJ SUR RELOJ

Por amikoj de la fervojo estas ĝojinde, ke sur la trakoj de Ĉeĥaj Fervojoj finiĝis jam tempo de unueca koloro por ĉiuj lokomotivoj kaj motorvagonoj, kaj ke la beluloj reaperas en siaj originaj farboj kaj emajloj. Spertaj riparistoj en la lokomotivdeponejo en Veselí nad Moravou revenigis sur relojn post riparo kaj relaxado dizelelektrajn lokomotivojn por la linioj Kunovice - Uherský Brod, Kojetín - Valašské Meziříčí, Břeclav kaj Veselí nad Moravou - Nové Mesto nad Váhom.

## RASTISLAV KAJ SVATOPLUK

De post la nova trajnhoraro 1993/1994 du rapidtrajnoj, trafikantaj nuntempe sen nomo inter Bohumin kaj Bratislava tra Břeclav havos jam sian nomon. La trajno 833/834 trafikas laŭ nuntempa horaro ĉiutage matene al Bratislava kaj antaŭvespere ĝi revenas. Ankaŭ de post nova horaro ĝi trafikos preskaŭ dum la sama tempo kiel nun, tamen kun diferenco, ke ĝi trafikos ĝis Ŝtúrovo en Slovaka Respubliko kun numero 630/631. Nove ĝi estos nomata Rastislav laŭ moravia princo, reganta en tempoperiodo 846-870.

En la jaro 846 post morto de princo Mojmir I, la fondinto de la regno, kiun la historiistoj nomas Granda Moravio, invadis Moravion franklanda reĝo Ludoviko Germano kaj kiel reganton li starigis tie Rastislav-on, la nevon de Mojmir. Duko Rastislav komence kunlaboris kun Ludoviko Germano, sed post certa tempo ili malpaciĝis, fariĝis rivaloj kaj senĉese interbatalis. En 863 alvenis Moravion laŭ peto de Rastislav du apostoloj el Bizanco, anoncantoj de kristana kredo, la fratoj Cirilo kaj Metodio, kiuj kreis la unuan slavan alfabeton kaj literaturan lingvon.

Ĉirkaŭ 870 Moravio estis invadita kaj okupita de Frankoj kaj Bavaroj, la princo Rastislav estis arestita kaj blindigita. En frankajn manojn transdonis lin lia nevo Svatopluk, kiu poste mem okupis lian postenon de reganto. La princo Svatopluk el Nitra famiĝis kiel potenca reganto kaj lian superanĝon rekonis ne nur Moravio kaj Nitra-regiono, sed ankaŭ aliaj triboj en Ĉeĥio, Luzacio, en Silezio kaj Panonio. Svatopluk regis en la jaroj 870-894 kaj laŭ legendo li havis tri filojn. Nuntempaj historiistoj asertas, ke filoj estis nur du.

La pli aĝa Mojmír II fariĝis reganto de la regno, la pli juna Svatopluk estis komisiita administri la Nitra-provincon.

Laŭ la potenco reganto Svatopluk ricevis nomon la trajno 632/633, kiu trafikos en mate-naj horoj el Štúrovo en Slovaka Respubliko tra Bratislava al Bohumín en Ĉeĥa Respubliko kaj posttagmeze reen el Bohumín al Štúrovo. Oni esperas, ke ambaŭ trajnoj restos regule trafikanta-taj ankaŭ post divido de Ĉeĥio-Slovakio kaj ne perdiĝos el la horaro, simile kiel en la jaro 894 mistere perdiĝis la potenco reganto Svatopluk, kiu laŭ le-gendo vivis poste plu kiel nerekonita monaĥo en monaĥejo Zobor kaj laŭ pli posta legendo el tempo de baroko li reviviĝis kiel reĝo Ječmínek.

J. Tomíšek

## EL HISTORIO

La kompanio Imperiestraj-reĝaj privataj Ĉeĥaj Nordaj Fervojoj (K.K. priv. Böhmsche Nordbahn-Gesellschaft) komencis trafiki en 1887 per konataj provtrajnoj la 9an kaj 10an de oktobro. La 16an de oktobro sekvis solena veturo el Srní-Zákupy al Praha-Brusky tra Byšice-Úžice-Kralupy, ĉar rekta kunligo al pli posta Těšnov tra Neratovice tiam ankoraŭ ne ek-zistis... La solenan veturon partoprenis ankaŭ la tiama ŝtat-estro por transporto, ĝuste restanta en sia somera sidejo en Zákupy (ornamita per murpen-trajnoj de Antonín Navrátil). La nova linio estis parto de la linio Prago - Geordswalde longa 180 km kaj 261 metrojn. Poste estis aldonitaj linipartoj Bakov-Turnov (22 km), Benešov nad Ploučnicí - Česká Lípa (20 km), Chotětov - Dolní Cetno (8 km), Chřibská - Teichstadt - Varnsdorf (11,5 km), Kamenice Česká - Šenov Kamenický (171 km), Kralupy - Neratovice (17 km), Podmoklí - Tannenberg (40

km), Röhsdorf - Cvikov - Nový Jablonec (16,783 km), Rumburk - Mikulášovice (26,842 km) kaj triliono al Elbo en Děčín (0,818 km). Suma longo en la unua jardeko estis 348,431 km.

En 1905 Ĉeĥa Norda Fervojo posedis 102 lokomotivojn, 82 tendrojn, 236 pasaĝervagonojn kaj 2079 varvagonojn. Loka komerca fervojo el Česká Lípa al Šenov Kamenický kun fiera germana nomo *Localbahn Böhmsche Leipa - Steinschonau* (longa 21,748 km) transportis tiujare 37 215 pasaĝerojn kaj 24 347 tunojn da varoj.

Laŭ H. Böhmová esperantigis JT


## REKTAJ VAGONOJ AL KURACURBO

Vizitantoj de la fame konata banloko Karlovy Vary povas vojaĝi per rektaj vagonoj sen transvagoniĝo al Beogrado, Berlino, Bukareŝto, Boulogne sur Mer, Calais, Karlsruhe, Kolonjo, Oostende, Parizo, Varsovio kaj Vieno.

El kuracurbo Mariánské Lázně forveturas rektaj vagonoj al Berlino, Wrocław, Varsovio kaj Vieno kaj el kuracurbo Františkovy Lázně al Vieno.

Se vi ekĝojis, ke de post nova trajnhoraro vi povos uzi unu el tiuj ĉi agrablaj ŝanĝoj, mi devas nevolonte seniluziigi vin. Temas pri propono laŭ horaro de Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj el la jaro 1928.

-JT-



## KURAC-EFIKA BILDO POR ESPERANTO

Por Starto kaj ĉefe por ĉiuj ĝiaj legantoj alportis s-ino **Štěpánka Rousková, Reiki-kuracista**no, interesan desegnon. Ĉar en nia lando iom-post-iome kreskas intereso pri la aferoj de naturkuracado kaj psikotroniko, sed tamen multaj homoj pri ili scias nur ne multon, ni petis ŝin pri intervjuo. Ŝi ne rifuzis nin. Do, kiun signifon havas la alportita bildo?

Sanigaj influoj de diversaj signoj, ekzemple krucoj, spiraloj ktp., estas el la vidpunkto de la alternativa medicino nedubindaj, same kiel influoj de multaj desegnaĵoj kaj pentritaj bildoj. Kuracajn efikojn de la bildoj kaj desegnoj versimile kaŭzas bioenergio akumulita en ili fare de desegnisto aŭ pentristo, nekonscie aŭ inten-ce. En nia lando estas konata, almenaŭ por tiuj, kiuj interesiĝas pri psikotroniko, persono de naturkuracisto kaj pentristo Karel Kožíšek el Brno. Antaŭ nelonge mi havis okazon peti s-ron Kožíšek pri kurac-bildo por Esperanto kaj esperantistoj. Post longa silento alvenis de li letero kun vere altvalora donaco - kun la bildo "por Esperanto". Laŭ mia opinio kaj laŭ opinioj de aliaj sensivuloj temas pri vera radiilo de kuracenergio.

**Kaj kion vi konsilas al tiuj, kiuj volas plibonigi sian sanon helpe de la bildo, kvakam ili scias pri la afero malmulton aŭ nenion?**

Eble vi konas la libron kun pentraĵoj kaj desegnoj kaj ankaŭ kun ideoj de s-ro Kožíšek. La libro, eldonita pasintjare, havas titolon "*Kniha ktera léčí*" (La libro, kiu kuracas), kaj fakte multaj homoj jam elprovis kuracefikojn de liaj bildetoj. El la libro mi por ĉiuj elektis tri metodojn,

pere de kiuj vi povas ĝui la kuracajn efikojn de la desegnaĵo por la esperantistaro:

1. Enpaŝu en la bankuvon kaj per ne tre varma akvo duŝu viajn krurojn de la genuoj malsupren, sed ne pli longe ol dum tri minutoj. Per tio vi forigos la malnovan aŭron. Poste lasu la krurojn sekiĝi, sen viŝado. Sidiĝu antaŭ la desegnaĵo, malstreĉiĝu, por momento retenu la spiron. Necesas seniĝi je pensoj pri ĉiutagaj zorgoj kaj koncentriĝi al la desegnaĵo. Grave helpas preĝo.


2. Etendu la manplatojn kontraŭ la bildo, vi sentos en ili mildan formikadon. La sensivuloj tuj, la ceteraj homoj post diverse longaj tempoj. Ĝi estas tre delikata kaj malrapide ŝoviĝanta al la ŝultroj, kolo, kapo. Tuj kiam vi eksentos la formikadon en la kapo, penu ĝin en la menso transiĝi al la loĝoj, kiujn vi volas kuraci.

3. La desegnon vi povas utiligi por preparo de kuraca trinkaĵo. La ideala maniero estas meti ĝin en lernejan travideblan plastan koverton. Provu meti sur ĝin kruĉon aŭ glason da akvo. Dum tri minutoj estos la akvo dekstraĝire magnetigita, kiel vi facile konvinkiĝos per pendolo aŭ per vergo. El la akvo vi povas kuiriri teon aŭ konsumi ĝin alimaniere. S-ro Kožíšek rekomendas eltrinki eĉ 1 litron da tiel preparita akvo ĉiutage. La akvo estas uzebla ankaŭ por banado.

**Se niaj legantoj dezirus ekscii pli multe pri aferoj de naturmedicino, ĉu ili povus skribi demandojn por vi?**

Mi volontege respondos. Kaj eble helpos ankaŭ aliaj miaj kolegoj, esperantistoj. Ĉiu povas skribi aŭ al la adreso de Starto, aŭ rekte al mia adreso: **Štěpánka Rousková, p.k. 300, 251 01 Říčany u Prahy.**

**Dankon.**





## Ni funebras

Parencaroj kaj konatoj kune kun membroj de Esperanta rondeto "Amikeco" el Česká Třebová adiaŭis lastfoje la 29-an de decembro 1992 s-ron Ing. Emil Jindřich, aktivan membron de la loka rondeto, kelkjaran prezidanton de la fervojista sekcio de ĈEA kaj kontribuinton al la internacia fervojista movado. Sincere rememoras Esperanta Rondeto "Amikeco"

**JUAN RÉGULO PÉREZ** fama Esperanto-eldonisto kaj aŭtoro forpasis en sia hejmo La Laguna la 27-an de januaro 1993.

La 27-an de januaro 1993 mortis en aĝo de 97 jaroj s-ino Anna Rejthárková el Hradec Králové, multjara membro de ĈEA kaj IKUE. Ing. Klíč dediĉis al ŝi poemon:

### Mi ne plu kantos

Kiam lastan fojon mi ekpreĝos rozarion,  
kiam lastan fojon mi kisetos la patrinon,  
kaj ĉesigos oni mian sobran melodion,  
mi ne plu kantos.

Kiam lastan amon al la mondo mi donacos,  
kiam mian sangon la rabistoj ekdrinkaĉos,  
tiuj laŭdatiĝos, kiuj al homar' domaĝos,  
mi ne plu kantos.

Kiam mian kanton stratvaguloj senceligos,  
kiam mian koron fiinduloj malpurigos,  
per viando mia la gehundoj sin satigos,  
mi ne plu kantos.

Kiam kruco mia staros sur la Kalvario,  
kiam ĉirkaŭigos la terura min senvivo,  
kaj sur min kraĉata estos la venensalivo,  
mi ne plu kantos.

Tiam, en la temp' de fantazia malsaniĝo,  
tiam, tempe de la tragedia malfeliĉo,  
eble aliulo pro la sama freneziĝo  
volonte kantos.

---

## Esperanto-Muzeo en Gray

Franca Nacia Esperanto-Muzeo en Gray naskiĝis en 1976 ĉe la unua etaĝo de iama gimnazio en la orientfranca urbo Gray (19 rue Victor Hugo, 70100 Gray). Malfermita merkrede kaj sabate (15-18 h) aŭ laŭ interkonsento kun la kuratoro. Sur 230 kvadrataj metroj en 8 ĉambroj, 134 metroj da bretoj, 145 m<sup>2</sup> da

diversaj afiŝoj, 81 m<sup>2</sup> de dokumentoj ekspoziciitaj sur tabloj; 25 m<sup>2</sup> da ekspozicijpaneloj; 1000 kovertoj kaj poŝtkartoj kun teksto en Esperanto; 6000 libroj kaj broŝuroj, 1200 titoloj da revuoj; centoj da unikaj dokumentoj. ĉirkaŭ 400 vizitantoj jare.

Mondonacoj bonvenaj!

## ICEM-RENKONTIĜO EN PARDUBICE

Esperantista Klubo "dro Schulhof" en Pardubice invitas vin al Internacia renkontiĝo de pedagogoj, kiuj interesiĝas pri Freinet-tekniko: **14.VII.-23.VII.1993** en konstrua lernejhejmo en Pardubice-Rybitví (3-litaj ĉambroj, WC kaj duŝo en la etaĝo, manĝejo). Prezo **2500 Kč** (3x manĝo ĉiutage, 2 tuttagaj kaj 2 duontagaj bus-ekskursoj, enirbiletoj por 3 kasteloj kaj 3 muzeoj). Aliĝilon sendu ĝis 15.6.1993 al adreso de Jarmila Rýznarová, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice, Ĉeĥa respubliko, kaj la sumon 2500 Kč al Česká spořitelna a.s., okresní pobočka v Pardubicích, Palackého 1908, 530 02 Pardubice - konto 834553 - 568/0800.

En la aliĝilo indiki vian nomon, naskiĝdaton, adreson, legitimilon, profesion, ĉu vi venos sola aŭ kun familiano.

ICEM (Internacia Celado de Edukado Moderna per Esperanto) prezentas metodon de la franca instruisto de elementa lernejo en Bar-sur-Loup (vilaĝo apud Nico) Celestin Freinet (1896-1966), kiu en 1935 fondis propran lernejon. La gvidaj ideoj de Freinet-pedagogio estas instruado rilatanta al la vivo, neceso krei motivantajn situaciojn, eviti skolastikon, instrui per natura metodo per provhezitoj eksperimentaj, laborigi lernantojn laŭ aparta ritmo kaj nivelo de ĉiu el ili.

**Nove fondita privata Esperanto-Superlernejo en Ulaanbaatar en Mongolio** deziras starigi ĉiufankajn rilatojn kun esperantistoj kaj esperas pri subteno kaj helpo, ĉar mankas instruistoj, lern- kaj legolibroj, vortaroj, sonbendoj kaj aliaj lernomaterialoj: C. Hasbaatar, poŝtfako 44, pk. 623, Ulaanbaatar, Mongolio.

## 29-AJ BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ

Agrikultura teknikumo en vilaĝo Priekuli, Cesis-regiono, Latvio, 09.-17.VII.93, proponas seminariojn pri Baltio kaj la mondo, paroligajn kaj perfektigajn kursojn, Ĉe-metodan kurson por komencantoj, seminarion de klubestroj kaj aktivuloj, internaciajn vesperojn, lignofajrajn vesperojn, ekskursojn, lumbildojn, libroservon.

Prezo: 6 - 36 dolaroj por unu tago (laŭ kvalito de loĝado). Adreso: BET-29, p/k 150, Riga 50, Latvio, LV-1050.

ASOCIAJ EKZAMENOJ ne okazos 24-04-1993, kiel ni anoncis en Starto 1/93, sed 15-05-1993 en Přebyslav aŭ 23-05-1993 dum la ĉeĥa-germana kongreso en Karlovy Vary (laŭ interkonsento kun kandidatoj kaj organizantoj). Ankoraŭ eblas aliĝi ĉe Miroslav Malovec, Bosoňovská 15/10, 625 00 Brno.

LINGVA SEMINARIO de la junulara sekcio okazos en Přebyslav 7/9-05-1993. Aliĝojn akceptas Vlačka Chvátalová, ČEJ, Jilská 10, 110 00 Praha 1.

## RENKONTIĜO DE KOLEKTANTOJ

ESPERANTO Klubo Strážnice, distr. Hodonín, bonvenigas ĉiujn kolektantojn de poŝtmarkoj, moneroj, glumarkoj, insignoj ktp. al tradicia printempa renkontiĝo de kolektantoj de ĉiuj fakoj, kiu okazos dimanĉe, la 25-04-1993 en la kulturdomo STRÁŽNICĀN en Strážnice de la 8-a horo.

Interesatoj povas aliĝi rekte ĉe s-ino J. Kopencová, telefonnumero: 0631/942 762, aŭ je la adreso: KD STRÁŽNICĀN, Velská 1321, 696 62 STRÁŽNICE.

Ota Pavel  
ONI POVAS VIN EĈ MORTIGI  
tradukis Marie Břehová

En Buštěhrad estis du fiŝlagoj. Ilin ambaŭ disigis la soseo kaj la digo kun poploj. La nova fiŝlago neniam min allogis - ĝi havis tiajn malvarmegajn bordojn, plejparte el ŝtonoj kaj brikoj. La malnova fiŝlago estis tute alia.

Parton da bordoj ĝi havis kovritan per anseraj herbetoj. Ĝi bonodoris de rivereto, kiu enflugis lagon preter la Oplt-gastejo, kaj fetoris de sterkakvo, elfluanta el bienoj. Ĝi bonodoris de salikoj maljunaj kaj de la koto, en kiu karpoj kuŝis kaj ruligadis siajn ventretojn, kaj odoris de biero, kiu ĉi tie ŝaŭmis en proksima bierfabriko.

En centro de mia atento naĝis karpoj, kiuj estis nove lokitaj ĉi tien. Ĉiam mi ankoraŭ ne kapablis forgesi perkojn de Křivoklát kaj batalemajn barbiojn, kiujn mi iam kaptadis. La fiŝoj naĝis en mia sango, mi deziris ilin denove kaptadi: en Buštěhrad ne estis eble. Nenie fluas bona roĵo, nek rivero. situas ĉi tie nur fiŝlagoj kun avertotabuloj, ke kapti fiŝojn oni malpermesas.

Mi rigardis la fiŝojn, kiel senzorge ili vagas en la akvo, kaj evidente pri nenio pensas.

Ili translokiĝadis en la lago de loko al loko, kaj veturadis kiel soldataro en svarmoj. Vojaĝis en rondiroj kaj paŝtis sin. Kiam la ombro de poploj kliniĝis al mia fiŝlago, mi rampis sur salikon kaj softe rakontis al ili. Al mi ŝajnis, ke ili turnmovas orelojn kaj aŭskultas. Estis belegaj, latune oraj kaj kiam ili metis kapriolaĵojn kaj staradis surkape, mi vidis iliajn flavajn, grasajn ventrojn. La laboristoj el bierfabriko nutris ilin per malto. Tiam mi bezonis la agrablan, grasan karpan viandon por ni, kaj por interŝanĝi. Je faruno, pano kaj cigaredoj por panjo. mi nome jam vivis nur kun ŝi, ĉiuj ceteraj estis en koncentrejo.

Ĉiam mi ankoraŭ malmulte la karpajn konis. Mi devis scii, kiam ili havas la bonan kaj malbonan humoron, kiam ili estas malsataj kaj kiam plene sataj, kiam ili emas ludi. Mi devis scii, kie ili naĝas kaj kie estas vane atendadi ilin. Jam mi pretigis la firman mallongan vergon, hardikan ŝnureton, la drivkorketon kaj hoketon. Mi ne povis komenci, nur kiam mi ekkonos miajn malamikojn. La malamikoj ne estis karpoj, sed unualoke la homoj. El fenestroj de kastelo sonadis la dolĉa germana gramofona kanto Lily Marlén kaj al la regalo oni servis ĝuste la karpajn. En la urbo vivis kelkaj denuncantoj, kaj tiuj havis la fenestrojn malfermitajn larĝe, ke nenion ili preterlasu aŭdi, kaj nenion maltrafu. Kaj ankaŭ loĝis en Buštěhrad sinjoro František Záruba, kiu gardis la karpajn. Estis la unua fiŝgardisto, kiun mi en mia vivo renkontis. Mi devis lin ekkoni, samkiel la karpajn. Kiam li estas bonhumora kaj kiam lin regas kolero, kiam li iras manĝi, kiam iras al lagoj, kaj kiam li absolute ne venas tien. Mi devis konatiĝi kun li. mi metis do grandan ĉapon de mia avo profunden al miaj okuloj, lian veston malnovan mi vestis kaj eklamis. Li ne darfis min memori. Kiam mi lin ekvidis unuan fojon, mi konsterniĝis. Li estis ĝiba, li havis ĝibon eble kiel tiu konata sonorigisto ĉe Notre Dame, la povra Quasimodo. Kaj li estis malgranda. Li ne kapablis fari grandajn paŝojn, nek saltojn, nek kuri rapide. Neniam li povus min kuratingi. Sed de patrino mi sciis, ke



kelkaj tiaj homoj povas esti tre malbonkoraj. Ili venĝas al homoj pro tio, ke ilin signis Dio.

Al arbaro direkte Driň-vilaĝon mi iradis trejni kuradon, por ke mi povu, en kazo de neceso, forkuri. Poste mi ankaŭ vespere iris rigardi la karpojn, ĉu ili ne ŝanĝis siajn kutimojn. en difinita tempo ĉiun momenton ekflagris la malhela ombro sub saliko. La venontan tagon mi jam venis kun mallonga vergo sub mantelo. Sur la digo staris gastejestro Josef Oplt kaj min trarigardis per sia unusola okulo, la duan li havis mortan, vitran. Mi dece lin salutis kaj en animo timeme preĝis: "Sinjoro Dio en ĉielo, ne perfidu min. Sinjoro Oplt, mi petas vin, ankaŭ vi min ne perfidu. Ja mia avo Ferdinand vizitadis vian gastejon por kartludi, ludi mariaĵon kaj lasis ĉe vi multan monon. Almenaŭ diradis tion avino Malvína. Amen."

Mi rampis sur la salikon kaj eltiris vergeton. Mi alkroĉis paston, faris logan globeton. Ĉirkaŭ la fiŝlago estis trankvilo kaj ĉi tien estis maleble vidi. El la bierejo suprenŝvebis fumo, biero bolis en kaldronoj. La rojeto bonodoris kaj salikbranĉoj susuris. Germanoj fermis jam la fenestrojn de la kastelo, ĉar estis jam malvarme. Denuncantoj jam kaŝiĝis hejme. František Záruba vespermanĝis. En tiu momento kaptiĝis mia unua karmo. La korketo komencis danci kiel baletistino, poste ĝi saltis sub akvon kaj fine sub salikon. Mi forte ektiris kaj sentis grandan trenon. Ĝi estis kuraĝa karmo. Ĝi skuis, skuis mian mallongan frondon, fine kaptetadis aeron kaj kapitulacis. Belulo. Latune ora kaj nun flava bierfareja ventro, plenigita per malto. Mi kaptis ankoraŭ unu kaj ŝteliris for kiel kato kun fiŝoj. Mi volis esti ĉe fiŝlago nur mallongan tempon, kun ĉiu minuto altiĝis minaco de mia danĝero. Mi preteriris sinjoron Oplt-on, li fumis cigaredon kaj silentis.

La patrino hejme kisis min pro la karmo, ja estis la kvara jaro de milito kaj manĝo ofte mankis. Eĉ ŝi, povrulino, bone ne sciis, ke por mi la afero povas finiĝi per granda fiasko. Baldaŭ ili sciis pri mi. Iu denuncis tion. Iu el la denuncantaj fenestroj deklaris al Záruba. Mi sentis, kiel la aranea reto fermiĝas ĉirkaŭ mi, mi vidis nubojn super mia malnova fiŝlago. La lago en lasta tempo ŝajnis al mi malbonkora, kolera, la ventego skuis ĝin kaj ondoj minace plaŭdis la herboriĉajn bordojn. Ankaŭ la bierfabriko ŝajnis al mi malserena kaj biero de malproksimo malbonodoris.

Mi kaptis kelkajn pliajn karmojn kaj atakis min la timo. Ĉiuj el nia familio estis jam en koncentrejo, aŭ mortaj. La avino Malvína, kiu riproĉis avon Ferdinandon, ke li ludas mariaĵon, oni jam laŭdire gasmortigis en Oswiecim. Kiam mi kuŝis en mia malvarma lito, ferminte la okulojn mi vidis la grizan aviadilon Heinkel kun nigraj krucoj sur flugiloj faligi bombojn. Poste mi prenis pantoflojn kaj promenis en tiu ĉi ege granda, malbenita morta domo. Mi tretis preter mia eta dormanta panjo, kiu treege suferis nur tial, ke foje ŝi edziniĝis antaŭ dio al judo kaj ne volis kun li disiri antaŭ homoj. Mi observis ŝin, ŝi havis sulkojn sur la frunto, ŝi peze devis labori en kampoj. Eble, ke hodiaŭ ŝi ankaŭ ne vespermanĝis. Ŝi aspektis kiel eta infano kaj mi sentis min plenkreska, mi restis jam la unusola kaj lasta viro en la domo. Mi descendis la ŝtonan ŝtuparon al teretaĝo kaj iris softe preter la pordo, malantaŭ kiu jam neniu loĝis, nur la animoj de mortintoj. Ĉi tie iam vivis fraŭlino Hassoldová el poŝto-

ficejo, nun ŝi ripozas en Buštěhrad-tombejo. Ĉie araneoj kun krucoj surdorse kaj araneaĵoj. Mi eniris kelon. En ŝtona kuvo tie naĝis la lasta karmo, kiun mi kaptis. Ĝi naĝis nur en mallongaj turnoĵ tien kaj reen, kiam ĝi tuŝis per flegma buŝeto la ŝtonan muron, tuj ĝi revenadis. Min ĝi tute ne rimarkis, ignoris, kvazaŭ ĝi sciis, ke mi rakontis al ĝi fabelojn, ke en la mondo estas paradizo, kaj poste trompis ĝin, kiel ĉiuj homoj, promesantaj paradizon. Morgaŭ mi iros denove al lago kaj alportos al ĝi frateton kaj fratinon. Ili ĉiuj havos orajn okulojn kaj lumoj per ili kiel per oraj lanternoj.

Sekvantan tagon vespere, kiam fermiĝis la kastelaj fenestroj kaj kiam Záruba sidiĝis al vespermanĝo, mi prenis denove mian mallongan vergeton kaj iris al la digo. Preter la poploj, el kiuj faladis malsupren la petalfolietoj kaj preter sinjoro Opl't, kiu staris sur la digo kaj fumegis. desur la saliko mi kaptis la unuan karpon. Ĝi aperis, englutis la paston kaj estis mergiĝinta kiel la subakva ŝipo. Mi metis ĝin en sakon kaj kovris ĝin per ĉifono, ke ne tiom ĝi plaŭdu. Kiam mi provis kapti la alian, aperis Záruba. Do li ne vespermanĝis. Li gvatis ĉe la lago kaj min atendis. Li kriis de puto kaj kriis: Haltu, haltu, fripono! -

Li kuris peze kaj malrapide. Mi prenis vergeton kaj elpuŝiĝis kiel vetkuranta ĉevalo, mi kuris ĝis Opl't, staranta sub arboj. Opl't silente montris al mi malfermitan pordeton de sia korto. Li diris: ŝlosu vin en lignejo! - Kaj post momento mi aŭdis, kiel Záruba siblas kaj kun Opl't disputas pri io. Mi aŭdis ankaŭ en sako anhelu la frateton karpon, sed mi mem preskaŭ ne spiris. Mi terurege timis. Homoj kiel Záruba estas malbonkoraj. Ili povas vin eĉ mortigi.

Sinjoro Opl't malfermis al mi eble nur post unu horo, trankvile mi povis iri hejmen.

Venontan tagon mi iris denove, ĉar mi opiniis, neniu pensos, ke mi estas tiel aŭdaca. Opl't jam tie ne staris, evidente li nenion komunan volis havi kun la afero. Apenaŭ mi eksidiĝis sur saliko, jam aperis Záruba. En la mano li tenis mallongan bastonon, similan al policista gum-klabo, per kiu oni povus elbati cerbon de ido, kia estis mi. Tuj mi komprenis, ke Záruba estas saĝa kaj sagaca kiel Quasimodo. Li estas pli danĝera malamiko, ol germanoj en la kastelo aŭ la denuncantoj en fenestroj. Li konatiĝis kun miaj kutimoj, fine li atingos min per sia mallonga dura klabo. Li ekkomprenis, ke en miaj vejnoj cirkulas la ŝtelĉasista sango. Neniam mi forkuros antaŭ li, fine li atingos min kun sia dura, mallonga bastono. Li batos min ĝismute aŭ murdos min. Mi lasis lin proksimiĝi, ankoraŭ vojpeceton. Li kriis: - haltu, vi bastardo! Haltu, fekita judo! -

Mia koro jam ne doloris ĉe la ofendoj, mi kutimiĝis je tio dum la milito. Desaltinte de la saliko mi trakuris la digon kaj kuris inter la poploj. Mi sentis min malpeza kiel plumeto kaj sciis, ke li min ne povas kapti. La unusola el nia familio mi ne havis sur la piedojn katenojn kaj sur la kolo ĉenon. Mi do kuris kiel libera birdo en kampojn kaj per padoj ĝis la blua arbaro. Mi dormis sub piceoj kaj aŭdis nokte strigojn. En nian domon mi revenis nur matene. Panjo diris al mi, ke vespere serĉis min ĝendarmoj kun pafiloj kaj almetitaj bajonetoj. Poste ŝi ege ploris kaj genuiĝis antaŭ mi, ke mi neniam plu iru al fiŝlago. La ĝendarmoj jam ne venis. Mia konata majstro Knesl diris al mi, ke Záruba venis ĝendarmejon, kie li deklaris: - Kun la fripono mi

aranĝos mem la aferon. Estas mia afero. Mi estas ĉi tie fiŝgardisto. -

Mi ĉirkaŭiradis la lagojn per granda rondiro, mi sugestis al mi, ke tie naĝas krokodiloj kaj ŝarkoj. Kaj ankaŭ ke tie troviĝas polpoj, kaj min mergos en profundecon kaj ellasos sur min sian inkon malhelbluan de marko Barock, por ke panjo min ne trovu kaj ne povu min entombigi en softan tombon apud fraŭlino Hassoldová en Buštěhrad-tombejo. La fiŝlago ĉesis ekzisti por mi. Mi forĝis ĝin, dediĉinte min plene al futbalo kaj arbaro. Kaj ja ankaŭ mi devis labori. Iri kolekti spiketojn, el kiuj ni elbatis grenon aŭ iri elektadi karbon al ŝutmontetoj, kolekti karbon, por ke vintre ni havu ion por hejti.

Kaj poste mi eĉ ne scias, kiel okazis, mi simple iris kelon kaj tenis en la mano denove vergeton. Mia kapo turniĝis. Vi stultuleto, en la Malnova fiŝlago neniam estis iuj ŝarkoj kaj polpoj. En la Malnova estas nur centoj da karpetoj - fratetoj kun oraj okuloj.

Mi ne kapablis elteni la tenton.

Dum vesperiĝo mi eliris. Mi preteriris la poplojn kaj la digon, kie neniu staris. Eble mi eliris tro frue, sed jam mi iris, kaj ne volis reveni. Mi haltis ĉe saliko kaj daŭrigis la vojon ĝis pumpilo sur bordo de lago. por ke mi lin vidu el malproksimo, se li irus. Al mi kondukis tri ireblaj vojoj - unu ĉirkaŭanta la fiŝlagon, la dua el la kontraŭa flanko, ankaŭ preter la akvo. Kaj la tria mallarĝa strateto supren al lernejo. Unu el ĉi tiuj tri vojoj li povus veni, la du aliajn vojojn li povis fuĝi. Mi elpakis vergeton kaj ĵetis ĝin, sentante egan feliĉon vidi la korkon balanciĝi sur la akvonivelo. La akvo estis verda kiel arbar-herbaro kaj ĝi odoris de fiŝetoj. Ĉe malprofundaĵo kvakadis ranoj kaj el bierfabriko sonadis regula bruo de maŝinoj. La korketo komencis tremeti, mi estis enrevita, rigardanta akvon, kiam subite mi eksentis, ke io ne estas en ordo. Mi levis la kapon kaj konsterniĝis. Laŭ unu bordo de la fiŝlago al mi estis proksimiĝanta viro, kiun mi ne konis. De la alia flanko iris la dua. Mi forĵetis verĝon en akvon. Piedojn mi havis kvazaŭ mortajn. Ĉe la fiŝlago sternaĝis silento, mi aŭdis mian koron bati alarmon. Kaj mi elpuŝiĝis. Transsaltis la randon de pump-pupeto kaj ekkuregis strateton al la lernejo supren. Ĝi estis mia tria, la lasta kaj unusola ebleco. Mi plilongigis la paŝojn kaj denove mi konsciis la profundan strangan silenton en la urbo. La tuta urbo sendube mian vetkuron observis kaj estis favora al mi. Fenestroj de la kastelo estis malfermitaj kaj el ili elrigardis germanoj, lornoj ĉe okuloj.

Ankaŭ la fenestroj de denuncantoj estis malfermitaj, el ili rigardis ostecaj viretoj kun siaj edzinoj.

Mi per longaj paŝoj kuris strateton.

En la lastan kurbiĝon de vojo mi alkuris kaj antaŭ mi aperis Záruba mem. Li staris krurdismete meze de la strateto kiel nigraj gestapanoj, kiuj de tempo al tempo venadis nin traserĉadi. Kaj en la mano li tenis la mallongan bastonon, kiu similis la policistan gumklabon. Ambaŭflanke de la strateto altiĝis muroj, ĉi tien ne estis eble vidi.

Miaj genuoj sinkis. Li kaptis mian manon, mi kliniĝis atendante baton per klabo. Sed nenio okazis. Mi rigardis al li supren. Li emfaze ordonis al mi: Kriegu!

Sed mi nenion komprenis.

- Do, damne, kriegu! -

Nun mi jam ekkomprenis. Mi devis ja krii, pro la germanoj en kastel-fenestroj kaj pro la denuncantoj. Mi ekkriis, same kiel mi iam aŭdis krii porkon, kiam oni ĝin buĉis ĉe la avo Ferdinando el pistolo, kaj nek per unua, nek per la dua pafu sukcesis trafi ĝin. Mi kriaĉis jam reale, Záruba staris ĉe muro kaj vipis aeron per la dura mallonga bastono. Poste li ekskuis mian ŝultron kaj diris: - Jam sufiĉe. -

Nun do ni staris fronte, unu kontraŭ la alia, kaj rigardis nin reciproke. Ni estis la du lastaj en tiu ĉi urbo. Li, signita de Dio, mi markita, malbenita de superhomoj.

Li demandis: - Kion faras paĉjo? Ĉu li skribas al vi el la koncentrejo? -


Mi kapneis.

- Kaj la fratoj? - Mi kapneis denove. Nun sinjoro Záruba sin apogis ĉe la muro, trankvile bruligis cigaredon, kiel en iu kolonaro banloka kaj ekparolis pli longan prelegon: - Al Malnova fiŝlago vi jam ne iru. La Nova lago estas ankaŭ bela. Vi povas kaptadi ĉe terkulturistaj domoj. Tie vin neniu vidos, tie estas tute sendanĝera loko. Kaj la karpoj en la Nova fiŝlago estas, mi pensas, eĉ pli bongustaj. Sed vi iru tien dum mallumo, kiam la luno ne lumas. -

Mi gapis je li konsternita. Mi klinis la kapon, kapjesis, ke tiel mi faros. Kaj li aldonis: - Kaj nun jam iru, kaj lamu. Lamu ĝis via hejmo, same kiel tiam, kiam ni la unuan fojon renkontiĝis kaj vi havis surkape la grandan ĉapon, tiritan ĝis la oreloj, kaj kiam vi lamis, ke mi ne rekonu vin. Vi scias, tiam, tiam vi min trarigardis, kiel nome mi aspektas. - Mi ekridetis al li. La rideto ... ĝi estis la unusola afero, kiun mi kapablis donaci al li. Mi aŭdis, ke li diras al mi: - Al pasto aldonu ĉiam por la karpoj anizon. Ili tion ŝatas manĝi kaj rapide kaptiĝas.-

Mi lamis supren tra la strateto. Kaj li ekiris malsupren al Malnova lago. Li ŝvingis ĉe tio bastonon kaj fajfis al ritmo la konatan, belan germanan kanton Lily Marlen. Ĝi estis fakte bela kanteto, nur ĝenis ĉe ĝi, ke ĝin tiom amis la SS-anoj.

Mi revenadis hejmen, lamis kaj trarigardis Novan lagon. La karpoj nun vespere tie ludis ĉe akvonivelo kaj faris sur la fiŝlago cirklojn grandajn kiel ĉarumaj radoj. Ĉi tiuj karpoj certe manĝos paston kun anizo. Nur mi devos atendi kelkajn tagojn, kiam venos la mallumaj noktoj.



## EL NIAJ KLUBOJ KAJ SOCIETOJ

**Esperanto-Klubo Ostroj Opava** havas 44 membrojn kaj fondis rondeton kun deko da junaj esperantistoj ĉe la Distrikta Domo de Infanoj kaj Junularo.

Por la publiko preparis la klubo en 1992 ekspozicion "Panglottia" pri la 400-jara datreveno de Komenio kaj pri liaj ideoj pri internacia lingvo. En la ĉeĥlingva gazetararo aperis 6 artikoloj. J.Žák realigis serion de 36 diskutoj kun gelnantoj de la 8-aj kaj 9-aj klasoj de ĉiuj elementaj lernejoj en Opava. Kursojn por komencantoj partoprenis 9 personoj.

**Esperanto-Klubo Znojmo** aranĝis la 1.- 5.3.1993 la ekspozicion de bildokartoj en la Domo de infanoj kaj junularo. Temoj: folkloraj kostumoj; urboj kaj vilaĝoj; bestoj kaj floroj. Vizitis ĝin precipe infanoj de bazlernejoj.

2.3.1993 en la klubo prelegis tre interese s-ano Jaromír Polák pri Hispanio kaj prezentis kolorajn diapozitojn kaj bildkartojn pri tiu suna lando. La prelegon partoprenis ĉirkaŭ 40 homoj.

V. Rotrekl

### Alcedo - Ledňáček 1993

Sukcesa aranĝo de Junulara Sekcio ĈEA okazis en Horní Polubné ĉe dislimo de la montaroj Jizera kaj Karkonoŝa de la 28-a ĝis la 31-a de januaro 1993 kiel la unua E-aranĝo en la memstara Ĉeĥa respubliko. Partoprenis 29 plenkreskaj esperantistoj kaj 3 infanoj. El Pollando venis Zbigniew Jurasz el Bielsko-Biala, kiu jam partoprenis ankaŭ du antaŭajn "alcedojn". Programo: interkona vespero, konkursoj de grupoj, ski-ekskurso al Smédava, trajn-ekskurso al Harrachov, belvide-

jo Štěpánka, surneĝa vetglitado surdorse aŭ surventre (venkis suverene junulinoj), rampado tra neĝaj tuneloj (ĉampionis Petr Šmíd, kiu traŝoviĝis tra plej mallarĝa tunelo), diapozitivaj pri IJF en Italio kaj Kanado kaj pri la antaŭaj "alcedoj", diskotekoj kaj rostando de cervelasoj en salona kameno, skiado (laŭdindas Blanka Kubcová, fratoj Šlosárek kaj Jirka Mitáš).

Por la venontjara "alcedo" aliĝu ĉe: Honza Navrátil, Masarykova 1596, 415 02 Teplice.

### Esperanto-Klubo Strážničan

La 15-membra klubo apartenas al plej aktivaj enkadre de ĈEA, okazigas hobia-renkontiĝojn eĉ por neesperantista publiko, pasinjare aranĝis filatelan ekspozicion pri Komenio kaj por 1994 preparas SAT-kongreson. Famaj estas porokazaj poŝtstampoj okaze de diversaj datrevenoj (unua lernolibro de Esperanto, Komenio, Lorenz).

-VlHa-

### AL JUNAJ ESPERANTISTOJ

Ĉu vi jam pensis, kiel utiligi vian scion de Esperanto? Esperanton oni povas uzi sen membreco en iu organizo (ekz. por legi, korespondi, vojaĝi), sed la junulara sekcio de ĈEA proponas al vi pluajn eblojn: integriĝi en kolektivo de junaj homoj, kun kiuj vin ligas krom Esperanto ankoraŭ io alia, pli profunda; komune amuziĝi kaj fari ion por aliaj homoj; aktiviĝi en la Esperanto-movado; transpaŝi sin mem.

Ni okazigas aranĝojn, ofte kun eksterlanda partopreno, kun orientiĝo al **sporto** (skiado en Karkonoŝo, turisma aranĝo JUSETUR en Prago, flugigado de kajtoj-drakoj en Štítý apud Ŝumperk), al **kulturo** (vinseminario en Strážnice), al **klerigado** (preparseminario por asociaj lingvaj ekzamenoj) kaj por

**novuloj** (regionaj renkontiĝoj). La konkreta programo dependas de la konsisto de partoprenantoj kaj de la momentaj ideoj.

Se vi ne volas resti kun Esperanto sola, skribu al la adreso: Český esperantský svaz, Vládkva Chvátalová, Jilská 10, 110 00 Praha.

### "ESPERANTA LITERATURO"

estas la plej granda E-literatura revuo en Ĉinio. Bakin, la plej konata verkisto en la nuna Ĉinio, la prezidanto de Ĉina Verkista Asocio kaj honora patrona komitatano de UEA, estas la konsilanto. Konataj verkistoj Cicio Mar (Ĉinio) kaj G.R. Correa (Brazilo) estas ĉefredaktoroj. Centoj da verkistoj el dekoj da landoj publikigis en la revuo verkojn post ĝia fondo en 1986. Ĉijare ni volas okazigi internacian konkurson en novelo, prozo kaj poemo por evoluigi literaturon pere de Esperanto kaj disvastigi interkomunikiĝon kun esperantistoj literaturemaj en la tuta mondo.

Adreso: Esperanta Literaturo, P.O. kesto 9204, Shashi, Hubei, Ĉinio.

### ESPERANTO INTER SKOLTOJ

En la ĉeĥlingva ĵurnalo *Mladá fronta dnes* aperis jena informo: "Interesatoj pri Esperanto, Esperanto-gazetoj, Skolta Esperanto-Tendaroj kaj ankaŭ pri magazino Skaut-Junák, povas aliĝi ĉe Boris UHER, Strakatého 17, 636 00 Brno."

La distribuanto aldonas por la legantoj de Starto: Ekde Novjaro 1993 komencis aperadi ĉeĥlingva kolore ilustrata revuo Skaut-Junák kostanta 16,80 Kč por unu numero. Dek numeroj jare. Por 250 Kč li volonte sendos ĝin al ĉiu interesato ie ajn en Ĉeĥa Respubliko. Ne forgesu skribi **precizan adreson**.



### KORESPONDI DEZIRAS:

#### ITALIO:

\*\*\* Pianegonda Maria Luisa, Via Villafranca 15, 35010 Campodoro (Padova) 22j fraŭla lingvistino  
 \*\*\* Marilinda Ranpazzo, via Roma 28, 35010 Campodoro (Padova), 39j fraŭla frizistino \*\*\*  
 Anna Maria Bagnara, Via Nizza 116, 35016 Piazzola Sul Brenta (Padova) - 39j fraŭla dommastrino \*\*\*  
 Ferrari Claudio, Via Pontefranco 4, 35010 Villafranca Padova, 42j leterportisto  
 \*\*\*Luca Galdiolo, Via Pascoli 36, 35030 Caselle Selvazzano (Padova), 17j studento \*\*\*  
 Michela Galdiolo, Via Pascoli 36, 35030 Caselle Selvazzano (Padova), 14j studentino \*\*\*  
 s-ino Maddalena Galdiolo, Via Pascoli 36, 35030 Caselle Selvazzano (Padova), 42j dommastrino \*\*\*

#### USONO:

\*\*\* Tomm Schemm, 652 Summer St., New Bedford, MA 02746-1428, 26j viro interesiĝas pri ĉiuj temoj, kolektas bildokartojn, deziras korespondi tutmonde \*\*\*



HOMO ESPERANTICUS  
(Esperantisto)

- Mi eksiĝos de vi, se vi amuzos vin senĉese nur per la "EVENTOJ"!

(TP)

### Sekce mládeže

Českého esperantského svazu  
Ĉeĥa Esperanto—Junularo  
Jilská 10, 110 00 Praha 1  
tel.02/220262

**Předsedkyně/Prezidanto**  
Lucie Karešová, Tylova  
1262, 508 01 Hořice v Pod-  
krkonoší

**Místopředsedkyně**  
/Vicprezidanto  
Blanka Gruntová, Vítězná  
95, 784 01 Červenka (Cirkulero)

**Tajemnice/Sekretario**  
Ing. Jana Burianová, Pod  
Nemocnicí 35, 625 00 Brno

**Členky výboru**  
/Komitataninoj  
Vladimíra Chvátalová, Vyso-  
čanská 763, 582 91 Světlá  
nad Sázavou (Cirkulero)

Jana Charuzová, Dukelská 2,  
795 01 Rýmařov

## 'MATEMATIKO TRANSLIMEN'



Post dekjara paŭzo,  
nun reaparis *Matemati-  
ko Translimen*, neregu-  
la revuo de Internacia  
Acocio de Esperantistaj  
Matematikistoj, *IAEM*  
sub redakto de prof.  
Christer Kiselman. La

Jus aperinta numero estas havebla kontraŭ  
30 FF (10,2 NLG).

Pri la informoj kaj mendoj skribu al:

*IAEM, Francois Lo Jacomo,  
21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris, Francio*  
telefakso: +33-1-42412994  
UEA-konto: iaem-x

## Eventoj

*Internacia gazeto pri la E-Movado!  
Aktualaj informoj, faka aplikado,  
kaj represo de elektiitaj artikoloj  
el la esperanta gazetaro.*

**Hungara Esperanto-Junularo** invitas Vin al agrabla somera feriado en internacia esperantista etoso. **Internacia Junulara Semajno** okazos en kastelo de Mikoszáplak en okcidenta parto de Hungario, 35 kilometrojn de urbo Zalaegerszeg, kiun vi povas facile atingi pertrajne. Mem en la parko de kastelo estas banejo, sportejoj, romantikaj vojoj sed 4 kilometrojn for troveblas ankaŭ lageto kun kempingo kaj restoracio.

En la programo vi trovas ludojn, prelegojn, koncertojn. Ni organizos la tradicion balon kaj kompreneble ne mankos la programoj: nokta bivakfajro, diskoteko, ekskursoj, libroservo, nokta bufedo. Ni organizos karavanon al IJK en Bulgario, do vi povas prepari vian Esperanto etoson dum **IJS 1993**.

La partoprenkotizo estas inter 190 kaj 310 gld. Por la partoprenantoj el ekssocialismaj landoj: 6.000-12.000 HUF.

Informojn petu de **Tibor BUDAI, H-8900 Zalaegerszeg, pk. 263.**

Český esperantský svaz  
110 01 Praha 1, Jilská 10

\* \* \* STARTO \* \* \*

Nepravidelný věstník Českého esperantského svazu. Vychází 6x ročně. Je určen členům svazu. Odpovědný redaktor: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.** Administrátor: **Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2.**

---

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.**

Administratorio: **Karel Daněk, poŝta kesto 425, 660 25 Brno 2, Ĉeĥoslovakio**  
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio. Abonprezo: 14 guldenoj.



# NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:

č.j. P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991

Podávací pošta:

664 03 Podolí u Brna